TEJO-aktuale: numero 351, 2013-01-11

### [Roskilde Festivalo 2013] Grava mesaĝo por ĉiuj

*Malsukcesa elŝuto.*

### Fotoj de Andi de IJF Ostuni 2013

Mi ankoraŭ el Bari alŝutis miajn bildojn al Ipernity, post kelkaj tagoj ankaŭ al Facebook. Esceptokaze mi apenaŭ fotis homojn, sed la belan pejzaĝon kaj la ejon. http://www.ipernity.com/doc/krokodilo/album/307437

### [Somera Esperanto-Studado (SES 2013)] Ne forgesu ke finiĝos la 2a aliĝperiodo

*Malsukcesa elŝuto.*

### Ĉu vi konas la Esperantan muzikon? Pruvu!

Kiel? Partoprenu la konkurson de Muzaiko. Por limdatoj, premioj kaj reguloj vizitu: http://muzaiko.info/konkurso

### Printempa Esperanto KunvenO 2013, Kultura Centro "La Marlagne" (Namuro), Belgio, 17a-18a-19a de majo 2013

Mi denove invitas vin al la Beneluksa Kongreso. Speciala rabato! http://www.esperanto-wallonie.be/?q=eo/node/500

Amike, Valer.

### 12-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014

La 12-a NR ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2013 ĝis 3-a de januaro 2014, vendredo ĝis vendredo en Saarbrücken, samtempe kaj samloke kun la 5-a NIS, la programo por junuloj.

Ĉi-foje NR denove estos multe pli proksima al Francio, ja fakte Saarbrücken estas landlima urbo...

Ankaŭ suda Germanio kaj Svislando ĉi-foje pli proksimas. Ni do esperas, ke multaj el vi eluzos la fakton, ke ekzemple la trajna distanco inter Parizo kaj Saarbrücken estas malpli ol du horoj...

Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj...

Do, multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS...

Ĉu vi ŝatos festi kun ni novjare en internacia rondo?

Do venu al la 12-a NR! Aliĝu ĉe http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr

Ĉion bonan al vi kaj esperinde ĝis revido (plej laste) dum NR/NIS,

por la organiza teamo de NR/NIS, Lu Wunsch-Rolshoven

### Kalle Kniivilä en la aprila Malferma Tago

Unu el la plej konataj esperantistaj ĵurnalistoj, Kalle Kniivilä, estos la ĉefgasto en la 38-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de aprilo. Kniivilä estis estrarano de UEA pri informado 1998-2001 kaj tiam redaktis la dokumenton Gvidlinioj por informado pri Esperanto, kiu aperas komence de la Jarlibro de UEA. Nuntempe li estas konata unuavice kiel redaktanto de la populara retbulteno Libera Folio, kiun li lanĉis en aprilo 2003.

Kniivilä faros en la tago du prelegojn. Unu el ili temas pri specifaĵoj de la Esperanta gazetaro, dum en la alia li parolos pri tio, kio en la fenomeno Esperanto povus interesi profesiajn ĵurnalistojn.

En la programo estos krome libroprezentoj kaj filmoj. Krom de specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj, kaj gajni premion en senpaga loterio. Kafo kaj teo, same senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 488, 2013-01-11) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=488#1

### [esperantic.org] István Ertl instruos en la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) 2013!

*Malsukcesa elŝuto.*

### Invito al Frankfurt (Oder) 2013-05-01 – Ponta Festo

Mi invitas vin elkore al la jam tradicia „Ponta Festo“ de la urbo Frankfurt (Odro), Germanio, je la 1-a de majo 2013. Ĉikadre mi jam la kvinan fojon instalos informstandon pri Esperanto nome de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio.

La aranĝo okazos inter 10:00 kaj 18:00 h ĉefe en la regiono de la urboponto inter Frankfurt (Odro) kaj Słubice. En la proksimeco de la ponto (al norda direkto) ankaŭ instaliĝos nia informstando, rekonebla per Esperanto-flago.

Nia informstando memkompreneble bonege kaj konvinke denove demonstru, ke Esperanto ne nur funkcias, sed estas bona interkomprenilo inter la popoloj, do ankaŭ ponta lingvo. Pro tio ankaŭ estus bonega afero, ke mi ne restos la unusola esp-isto dum la festo.

Bedaŭrinde mi mem eble ne havos tempon por akompani vin dum via restado en la urbo ĉar mi devos resti ĉe la stando. Tamen multe okazos dum tiu ĉi tago ambaŭflanke de Odro kaj vi certe ne enuos.

Do, bv. veni multamase pro nia komuna celo – la uzado de Esperanto kiel ponta lingvo dum ponta festo! Mi proponas la jam tradician alvenon inter 13:00 kaj 15:00 h.

Rilate al ebla tranoktado ĉirkaŭ la unua de majo en Frankfurto ĉe Odro bv. turni al mi e-poŝte.

Elkore kaj optimisme, Ronaldo

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio: http://www.esperanto.de/BB/

Ronald Schindler

e-poŝto: RonaldSchindler ĉe web.de

fakso: (0331) 275483415

La tekston vi ankaŭ povas trovi sub la adreso: http://de.scribd.com/doc/134480343/Ponta-Festo-2013-Invito

### Venontaj renkontiĝoj

Esperanto-kastelo Greziljono, staĝo PRINTEMPaS, 20a de aprilo ĝis 1a de majo 2013, http://www.gresillon.org/printempo

Ekzotika Renkontiĝo, Berlino, Germanio, 26a de aprilo ĝis 28a aprilo 2013, http://is.gd/ekzotika2013

Aroma Jalto-2013, Jalta, Ukrainio, 29a de Aprilo 2013, https://www.facebook.com/events/1344321992374852/

7a TRE-EGE en Gladbeck, Germanio, 4a de majo 2013, Ludger Schmeink (ludger-schmeink ĉe t-online.de)

Printempa BARO 2013: planita por 8-a ĝis 12-a de majo 2013, http://www.krokodilo.de/baro/baro.php

2a Printempa Esperanto-KunvenO (PEKO 2), La Marlagne, Belgio, 17a ĝis 19a de majo 2013, https://www.facebook.com/events/428080153920714/

14a KEKSO en Nürnberg, Germanio, 17a ĝis 20a de majo 2013, https://esperanto.de/kekso

90a Germana Esperanto-Kongreso (GEK), Nürnberg, Germanio, 17a ĝis 20a de majo 2013, http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/000000/main/gekextern

Mojosa renkontiĝo en Oliva, Valencio, Hispanio, 21a ĝis 23a de junio 2013, http://esperantoval.com/eventoj/ver2013/ aŭ Oliva Esperanto-Klub' esperanto_oliva ĉe hotmail.com

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), Raleigh, Nord-Karolino, Usono, 26an de junio ĝis la 5an de julio, Bv. kontakti Ellen M. Eddy, la administranton (EDDYELLEN ĉe aol.com), aŭ vizitu http://esperanto.org/nask/

Roskilde Festivalo 2013, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 8a de julio 2013, http://roskilde.festoklubo.dk/rf13

Migrado de Olivier Buisson en la Vogezoj, Francio, 1a ĝis 5a de julio 2013, Oliver Buisson (obuisson ĉe live.fr)

Esperanto-kastelo Greziljono, SOMERA programo, 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013, http://www.gresillon.org/somero

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Utena, Litovio, la 6-an ĝis 14-an de Julio 2013, litova.ea ĉe mail.lt aŭ http://www.esperanto.lt

4a Ateliero de FEM, Kultura Centro Esperantista en La Chaŭ-de-Fonds, Svisio, 8a ĝis 13a de julio 2013, http://www.esperantio.net

46a ILEI-KONFERENCO, Herzberg am Harz (urboparto Sieber), Germanio, 12a ĝis 18a de julio 2013, http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de

Somera Esperanto-Studado (SES 2013), Martin, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio 2013, http://ses.ikso.net/

Nitobe-simpozio en Rejkjaviko, Islando, 18-20 julio 2013, Humphrey Tonkin (tonkin ĉe hartford.edu)

IEK2013, Saint-Amand-Montrond, Francio, 20a ĝis 26a de julio 2013, http://www.kava-pech.cz/iek

98a Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando, 20a ĝis 27a de julio, http://www.uea.org/kongresoj

86a SAT-Kongreso, Madrido, Hispanio, 28a de julio al 4a de aŭgusto http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

Internacia Junularo Semajno 2013, Tiszafüred, Hungario, 1a ĝis 8a de aŭgusto, http://www.ijs.hu/eo

Itala Kongreso, Kastelaro (Sanremo), Italio, 03a ĝis 10a de aŭgusto, http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo

63-a Kongreso de KELI, Svitavy, Ĉeĥio, 3a ĝis 10a de aŭgusto, polnicky ĉe quick.cz aŭ cea.polnicky ĉe quick.cz aŭ http://keli.chez.com/Aligilo2013.pdf

FESTO, Kelmis, Amikejo, Belgio, 10a ĝis 17a de aŭgusto, http://alesk.eu/festo2013/

69a Internacia Junulara Kongreso, Nazareto, Israelo, 19a ĝis 26a de aŭgusto, http://www.tejo.org/ijk

23-a KISO en Marburg, Germanio, 19a ĝis la 25a de aŭgusto 2013, http://www.esperanto.de/KISO

Oranĝa renkontiĝo 2013, Hernusando, Svedio, 6a ĝis 15a de septembro 2013, http://www.seju.org/or2013 aŭ https://www.facebook.com/events/607583009256372/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu